

## Financa raporto pri 2008

Kiel antaŭvidita en la buĝeto, la rezultkalkulo de ILEI por 2008 montras deficiton. Post almenaŭ kvin jaroj kun sufiĉe granda profito, tio ne estas zorgiga - des pli ke ĝi estis antaŭvidita kaj ne struktura. Plej rimarkebla en la rezultkalkulo de 2008 estas la konferenco en Benino kiu nek kostis nek kontribuis al la rezulto de ILEI. Ĝi estis financata - krom el kotizoj - el grandanimaj donacoj, el subteno de nia Fonduso Interkulturo, kaj el rezervita mono de pasinta konferenco.

Se paroli pri Afriko, necesas mencii ke al ILEI venis pluraj pliaj donacoj kaj heredaĵo cele al instruado en Afriko. Tiu mono ne estis bezonata por la konferenco en Benino, kaj ni opiniis ne juste ke konferenco en Afriko iel financu alian parton de la agado de ILEI kiel konferencoj dum aliaj jaroj faras. Pro tio, kreiĝis nova fonduso, Fonduso Afriko. Unua agado financata de ĝi estas la seminario en Kinŝasa, plia paŝo en la Afrika agado de ILEI.

Bona novaĵo estis ankaŭ la buĝetneŭtrala financa rezulto de Juna Amiko. Elspezoj iom falis, pro preskostoj, dum la enspezoj revenis al kutima nivelo - 1000 € pli ol en 2007. Tamen, necesas konsideri ke la aktivuloj kiuj preparas Junan Amikon laboras kontraŭ tre ege modesta honorario.

Zorgiga estas la malkresko de enspezoj el kotizoj el A-landoj kaj abonoj al IPR ekde rekorda jaro 2006, nur parte kompensita de ioma kresko en B-landoj kaj de retaj abonoj. La kotizoj ne kovras ĉiujn kostojn de la estraro kaj eldonado de IPR. Estraraj kostoj estis je kutima nivelo en 2008, malgraŭ ke la intensa laboro por Benina konferenco kaj planado de ĉi-jara konferenco instigis al du estrarkunsidoj. Pri IPR necesas mencii la kreskon de sendokostoj, kaj samtempe kresko de preskostoj pro unuafoja uzado de koloro en la kovrilpaĝoj. Menciinda estas ankaŭ ke la kotizoj de ILEI estis senŝanĝaj jam ekde 2004, kiam la niveloj fiksiĝis al 18 (membreco A-lando), 9 (B), 4 (A-lando kun reta aliro al IPR) kaj 2 (B, reta).

En 2008 ne okazis eldonoj de libroj, do la sumoj rezervitaj por tio en pasintaj jaroj restas je dispono en fonduso Szerdahelyi. Planoj por libroeldonoj tamen restas, kaj espereble baldaŭ realiĝos. Fonduso Szerdahelyi cetere ankaŭ disponas pri rimedoj por aliaj projektoj, pro kio la estraro esperas ricevi proponojn de la sekcioj. Fonduso Dazzini plue disponigas rimedojn por partopreno de ne-pagipovaj instruistoj en niaj konferencoj - rimedoj kiuj povus utili dum venontjara konferenco en Kubo. Plia fonduso, Interkulturo, estas daŭre uzata por interkultura agado - en 2008 en Benino. Laste, fonduso Erika Linz atendas subvencipetojn por esti uzata!

Fina rimarko rilatas al la nuntempe tre malfavora kurzo de la sveda krono. Granda parto de la enhavo de la fondusoj kaj propra kapitalo de ILEI troviĝas en bankokontoj en svedaj kronoj - dum ili estas administritaj en eŭroj. Rezulte, falo de la valoro de la sveda krono devus esti respegulita en malkresko de la valoro de la fondusoj en eŭroj. Praktike, ĉar kutime malkresko en unu jaro estas kompensata de kresko en alia, tio ne estas farata. Pro tio, la propra kapitalo de ILEI ĉi jare forte falis. Espereble, kaj laŭ iuj ekonomistoj antaŭvideble, la valoro de la sveda krono rekreskos post iom da tempo. Estas konsilinde dume lasi la rimedojn de ILEI kaj ĝiaj fondusoj grandparte en la svedaj kontoj.

Sjoerd Bosga, kasisto  
2009-07-05

Aldonaĵoj:  
Rezultkalkuloj de ILEI por 2008  
Fondusoj de ILEI dum 2008  
Bilanco de ILEI pro la jaroj 2008